

Kial Esperanto bezonas kulturan ĉefurbon?

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-795/236, 1979 januaro 04, 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

En la gravega kultura semajnfino, dum kiu en la urbo La Chaux-de-Fonds la du unuaj domoj de Gastejo Edmond Privat estis baptitaj je la nomoj de Ernest Naville kaj Pierre Bovet, sinjoro Giorgio Silfer prelege pritraktis la temon «Kial Esperanto bezonas kulturan ĉefurbon». Ni hodiaŭ resume citas lin.

A.- «Se ni konsideras la fenomenon ESPERANTO laŭ socia vidpunkto, ni devas alfronti esencan demandon : kie estas la radikoj de ĉi tiu lingvo ? kiu popolo vartis ĝin ? kies kulturon ĝi kristaligis ?

Cl.- «Same kiel la lingvo ne naskiĝis "a priori", sed ĝi estas la funkcia sintezo de pluraj idiomoj kaj de malsamaj strukturoj, la pensmaniero kiu maturiĝas malantaŭ Esperanto formiĝis "a posteriori", sur vivantaj, pulsantaj kulturoj.

A.- "La uua kultura ĉefurbo de Esperanto estis Varsovio; la Varsovio de la cara epoko, la Varsovio de popolo kun glora pasinteco fermente trempita en mallibera nuntempo, la Varsovio ĉefurbo de tiu nacio kiu plej amase akceptis judojn de la diasporo (ĝis tri milionoj en 1914) kaj plej terure spertis la genocidon de la dua mondmilito.

Cl.- Ni ne povas kompreni la animon de Esperanto, se ni ne analizas la medion kie vivis kaj laboris Zamenhof. Unuflanke tiu sento de aparteno al diskriminaciata kvankam klera minoritata diasporo; aliflanke tiu sento de aparteno al okcidenta Eŭropo kiu neglektas vin, kvankam vi kredas en via misio de restauronto de la roma kristanismo: tiuj du civilizaj frustracioj kunvivis en Varsovio, lulilo de Esperanto - kaj ili kvazaŭ fandiĝis kaj profundiĝis en la zamenhofa aspiro al ponto inter la popoloj, al neŭtrala lingvo por la interkompreniĝo de la homaro.

A.- "Ĉefurbo implicas la ekziston de aliaj urboj: en la epoko de la Varsovia poluseco grandan kontribuon donis ankaŭ Vieno, Londono, germanaj urboj, skandinavaj centroj; sed plej elstaran oferis du urboj franclingvaj: Parizo kaj Ĝenevo.

Cl.- "La itala kulturo ne estus naskita, sen la lingva kaj arta kontribuo de Toskanio, sed Italio mem ne estus imagebla, sen la sobra laboremo de Milano kaj Torino - analoge, la ŝuldo kiun Esperanto havas al la juda kaj al la pola kulturoj estas giganta, sed Esperantujo ne estus eŭropa realaĵo sen la protagonista rolado de la franclingva regiono.

A.- "Zamenof, Grabowski, Kabe, Kofman, Belmont kaj aliaj verkis aŭ tradukis en oriento; sed Bourlet, Cart, Boirac, Sebert kaj aliaj presis kaj organizis en okcidento. Tiu rolo plu daŭris post la mondmilito, tra la asocia laboro de Hodler, la reprezenta engaĝo de Privat, la vortara kontribuo de Saussure, Grosjean-Maupin, Waringhien kaj ĝi gardis la spiritan heredaĵon de Varsovio mem, kiam tiu ĉi urbo cedis la stafeton al Budapeŝto.

Cl.- La dua kultura ĉefurbo de Esperanto situas oriente, kiel la unua: la Budapeŝta posthabsburga, la vojkruciĝo de tri kulturoj, la ĉefurbo de tiu nacio kiu, atinginte sciencajn kaj artajn firstojn enviindajn fare de multaj "grandaj" lingvoetnoj, suferis pro la malatento de la ceteraj unuavice pro la lingva problemoj.

A.- "Ni ne povas kompreni la animon de Esperanto, se ni ne konas la fonon de la hungara kulturo. Tiu inklino al nomadeco, kiu igis Hungarion tiom gastama al ciganoj; tiu poeziado pri la amo al sia propra edzino, kion la okcitana poetiko forgesigis en la tuta okcidento; tiu strebo al okcidento kaj al fremdaj kulturoj, kun forta kontraŭdira sento pri la aristokrateco de sia lingva kaj kultura izolo - jen la filigrano de la Esperanta literaturo, kiu per Szathmári, Kalocsay, Baghy, Szilágyi kaj aliaj hungaroj trovis sian vojon al Parnaso.

Cl.- "Dum la kosmopolitismo de Privat aŭ la sennaciismo de Lanti mobilizis la Esperantan komunumon al la idealoj de paca interpopola konduto, judeco, poleco kaj hungareco profunde stampis la karakteron de tiu ĉi kolektivo, kiu, atendante la desupran ĝeneralan agnoskon, intertempe vivas sian diasporan vivon pli marĝene ol meze de la establitaj sistemoj.

A.- Giorgio Silfer, post tiu ĉi tre ĝusta historia priskribo de la kultura disvolviĝo de Esperanto, provis, analizi la nuntempan situacion. Jen ĉiam tre resume liaj konstatoj:

Cl.- "Post la dua mondmilito tiu ĉi plurpoluseco alscenigis aliajn angulojn de Eŭropo, kiel Skotlandon, Islandon, Nederlandon, Jugoslavion, Italion. Eĉ ekstereŭropaj lokoj ekludas senteban rolon.

A.- Dum la lastaj jaroj maturiĝis tamen nova konjunkturo: en la sulko de la tradicio de Privat, Hodler, Bovet, naskiĝis en Svislando organiza kaj kultura agadcentro, al kiu pivotas seriozaj lingvistoj kaj ankaŭ aktivaj literaturistoj, kiel Valano kaj la rondo de La Patrolo. Eble unuafoje la du paralelaj vojoj, de la literaturistoj emfazantaj la originalajn valorojn kaj de la aktivuloj promociantaj eksteren la portanton de tiuj valoroj, kuniĝas.

Cl.- Tiam Giorgio Silfer alvenas al la konkludo, ke "se la eksperimento de La Chaux-de-Fonds sukcesos, ĝi estos pli internacia ol la antaŭaj, ĉu pro la deveno de ĝiaj partoprenantoj ĉu pro la strebo stimuli analogajn iniciatojn ekster Svislando".

A.- Aldone al tiu tre resuma raporto pri la prelego de sinjoro Giorgio Silfer, ni menciis, ke li estas unu el la aktivaj literaturistoj, kiuj sentis sin pli kaj pli koncernataj ligiĝis al la eksperimento de La Chaux-de-Fonds, transpreninte gvid-rolon en la kadro de Internacia Fiera Altlernejo kiel kursestro. Krome la revuo Literatura Foiro, kies ĉefredaktoro li estas, translokigis sian redakcejon al La Chaux-de-Fonds. Giorgio Silfer finis sian prelegon per tiuj ĉi paroloj, kiuj bone sentigas lian spiritostaton, kiu honoras La Chaux-de-Fonds. Ni citas :

Cl.- "Oni bezonas kulturan ĉefurbon kaj oni vidas ĝin plej nature en la koro de Eŭropo, sur la fekunda grundo de la mondfederalisma tradicio, la tradicio de Privat".

A.- La estonteco diros, ĉu la strebado al la starigo de institucioj, kiuj renkontigu en la urbo La Chaux-de-Fonds lingvistojn, literaturistojn kaj aktivulojn, sukcesos doni al esperantujo kulturan centron aŭ ne.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), februaro 2013